

Prediko en Pelplin, 26an de julio

Matenpreĝo en Pelplin

Pacoŝipo en Amsterdamo

Post brulego

La aŭtoritato en Protestantaj Eklezioj

Pri la prelego

1: a listo de partoprenontoj

Aliĝilo al kongreso

Dankoj de Britta Rehm

Ŝanĝema eklezia komunumo

La kulpokonfeso de Stuttgart

Informoj

El alt'ĉiela venas mi

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel Polnický; Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ Cea.polnický@quick.cz

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,

DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- * Membro-subtenanto €30,- * Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- * pagante al Libroservo €18,- * Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. * Se estas en via lando UEA-poŝtĵirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI * Nederlanda poŝtĵirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574;

✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel Polnický

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

La aŭtoritato en la protestantaj eklezioj	79
Pri la prelego	84
Prediko en Pelplin, 26an de julio	86
Pacoŝipo en Amsterdamo	88
Post brulego	89
Dankoj de Britta Rehm	90
Aliĝilo al kongreso 2008	91
1a listo de partoprenontoj	93
Ŝanĝema eklezia komunumo	94
Matenpreĝo en Pelplin	95
La kulpokonfeso de Stuttgart	97
Informetoj	99
El alt'ĉiela venas mi	100

REDAKTORAJ VORTOJ

Unue mi volas pardonpeti ke la ĉi-aŭtunaj numeroj estas malfrue publikigitaj. Mia vivo estas pormomente iom kaota. Tio certe ankaŭ kaŭzos la decembran numeron iom pli malfrue veni ol kutime. Due mi volas pardonpeti ke en la pasinta numero forfalis teksto (vidu ankaŭ la paĝon 99). Espereble neniu grava problemo troviĝas en la nuna numero de nia gazeto.

Jam pasis la reformacia memortago. Antaŭ nelonge mi havis eblecon vidi la novan filmon pri Martin Luther. La filmo bone vigligis la tiutempan situacion. La kaŭzojn, sur kiuj la reformacioj baziĝis, ni nepre ne forgesu kaj ni ĉiam vivu en la sama sinteno – nia rekta rilato kun Dio kaj nia savo per Lia Graco. Se vi ne vidis la filmon, mi rekomendas ke vi vidu ĝin.

En tiu ĉi numero kelkaj artikoloj rekte/nerekte havas sian elirpunkton de tiu baza protestanta kredo.

La motoj de la Reformacio estis tri: la tri “sola”, *sola scriptura*, *sola fide*, *sola gratia*.
sola scriptura: nur skribo
sola fide: nur per fido
sola gratia: nur per graco.

Post la jarcentoj, post la evoluo de katolikismo per la katolika reformo en Tridento aŭ Trento, post la 2a vatikana

restaĵo en la diskutoj pri ekumenismo. Ĝi estas efektive kerna.

La ekesto de la Reformacio estis kontesto de la aŭtoritato de la Eklezio kiel institucio. Fakte la fido al la tiutempa Eklezio estis perdita, ne nur pro la diboĉa vivo de multaj tiamaj pastroj kaj ekleziuloj, kiel rakontas la historiaj lernolibroj, sed ĉefe pro la Indulgencoj.

La aŭtoritato en Protestantaj Eklezioj

Prelego de Philippe COUSSON dum la Ekumena Esperanto-Kongreso, Pelplin (Pollando) 2007

Koncilio, post la ekumenaj diskutoj ĉefe dum la 20a jarcento, tiu ŝajna abismo inter la eklezioj malpli grandiĝis rilate al la du lastaj *sola*.

Ekzemplo estas la komuna deklaro pri pravigo kiu estis subskribita de Luteranoj kaj Katolikoj.

Nun, ĉiuj agnoskas, almenaŭ je certa nivelo, ke la savo estas ricevata nur de la graco de Dio, sen ia ajn merito, kaj ke ĝi efektiviĝas nur per la fido de la kredanto.

Tamen, vi rimarkis ke mi iomete lasis noton, ke tiu komuna kredo ne estas vere plene komuna, ĉar por protestantoj ekzemple, en tiu savo ricevita de la graco de Dio per la fido de la kredanto, ne intervenas la Eklezio. Se estus, ne plu estus *sola gratia* kaj *sola fide*.

Sed, krom tiu preskaŭ konsento, restas la alia *sola*, kiu restas kiel malmola

Mi rememorigas, pri kio temis. En tiu periodo, 16-a jarcento, konstruiĝis la baziliko Sankta Petro en Romo, kaj oni bezonis monon. Monaĥo, nomita Tetzl, vojaĝis en Germanio por kolekti monon. Bone. Sed, li publikigis, ke donaco de mono provizos al la donacanto pli bonan savon, aĉeton de merito por la savo, ktp. Kaj tio al Luther aspektis skandale, pro



la bibliaj tekstoj, kiuj asertas ke la savo estas senpaga, senkosta, krom la kosto de la vivo mem de Kristo sur la kruco. Tial li afiŝis siajn tezojn sur la pordegon de la preĝejo en Wittemberg.

De tiam por protestantoj, pli aŭtoritatas la Skribo ol la Eklezia parolo.

Jen ekestis la bazoj de la Reformacio, kaj tiu aŭtoritato de la Skribo sola estas kaj restas netuŝebla. Jam de la komenco. Ekzemple, ĝi konsistigas la artikolojn 2 ĝis 5 de la Kredo-konfeso de La Rochelle. Alia nuntempa ekzemplo estas la loko, kiun havas la Biblio en la kredo-konfesoĵ evangelikaj, ofte la unua, antaŭ eĉ ol Dio mem.

Nun, ĉiuj agnoskas, almenaŭ je certa nivelo, ke la savo estas ricevata nur de la graco de Dio, sen ia ajn merito, kaj ke ĝi efektiviĝas nur per la fido de la kredanto.

Ĉio do rilate al la fido devas submetiĝi al la Sankta Skribo. Nenio povas esti asertita, kio ne estas konfirmita de la Biblio.

Se vi bone rimarkis, mi ĝis nun ne parolis pri estrado de la Eklezio en la protestantismo. En protestantismo, paroli pri aŭtoritato, ne signifas paroli pri gvidado de la Eklezio.

Skeme, la kompreno pri aŭtoritato por Protestantoj pli similas al kompreno kiun havis la Grekoj, kun la vorto *exousia*, ol al la kompreno kiun havis la

Latinoj, kun la vorto *autoritas*.

La greka vorto signifas aŭtoritaton, kiel liberecon por fari. La nocio ligiĝas al la vero, eĉ al la belo. Dum en la latina, la nocio rilatas al origino, al aŭtoro, al pligrandigo kaj konservo, al fondaĵo kaj sinsekvo.

La Protestantoj ne havas institucion por konservi, sistemon por transdoni, aŭ sinsekvon por plenumi. Tiu demando ne estas protestanta demando.

La protestanta demando rilatas al la vero, kaj al la transdono de la vero.

Do, bone, ni ĉiuj scias, ke la vero estas Kristo. Kaj ankaŭ, ke Kristo estas la ĉefo de la Eklezio, ŝia kapo. Efektive, Kristo estas la estro de la Eklezio, sed li ne havas vikarion, li ne bezonas vikarion. Anstataŭe li lasis sian Spiriton, la Sanktan Spiriton por gvidi la Eklezion. Kaj Dio ankaŭ lasis la Sanktajn Skribojn por gvidi la kredantojn. Tiujn Sanktajn Skribojn ni kutime nomas: Vorto de Dio aŭ Parolo de Dio.

Kristo ankaŭ estas la Vorto, la Parolo. La unua ĉapitro de la kvara Evangelio tion asertas, ke Jesuo estas la Logos, la vivanta Parolo de Dio. Sed, same estas la Parolo de Dio la Biblio, en tio ke ĝi entenas skribitajn vortojn por ni, vortojn inspiritajn de Dio, kiel diras la 2a epistolo al Timoteo.

Ĝia inspiriĝo troviĝas en tio ke la Sankta Spirito, kiu ne mem verkis, sed ke li gvidis la skribantajn atestantojn de la agoj de Dio, tiujn kiuj estigis la tekstojn, skribigis ilin, verkis kaj kunmetis ilin, tiujn, kiuj kopiis, elektis, tradukis, ilin, ktp.

Dio elektis por la transdono de la

mesaĝo, kiun li volis lasi al la homaro rimedon, kiu pasis per la homoj, per la vivoj de la homoj, per la kulturoj de la homoj, per la rakontoj de la homoj, per la valoroj de la homoj. La Biblio ne falis el Dio prespeta. Dio elektis la enkarniĝon ankaŭ de sia mesaĝo, de sia Parolo. Fakte, same kiel Kristo, ankaŭ la Biblio estas enkarniĝinta Vorto de Dio.

Tiu enkarniĝo havas kromajn signifojn. Tio estas ke, ĉar verkita kaj transdonita de homoj, ĝi enhavas homajn ecojn. Dio uzis por paroli al ni la homajn kulturojn, kuntekstojn, valorojn. Tio signifas, ke la agado de la Spirito ne finiĝis, sed ĝi daŭras en la interpreto kaj proklamo de la Parolo de Dio. La kompreno de la Biblio ne fiksiĝis, ĉar la homaj kulturoj ŝanĝiĝas, la valoroj evoluas, la kuntekstoj varias.

Por bone interpreti kaj prediki la Vorton de Dio, diversaj elementoj intervenas, ĉiu kun la propra rolo. Intervenias la racio, la inteligento, por analizi kaj kompreni la tekston. Simpla legado ne povas sufiĉi, eĉ povas konduki al miskompreno. Ankaŭ la interpretoj de la aliaj kristanoj alilokaj aŭ alitempaj povas helpi kaj konduki al pli ĝusta kompreno. Sed neniu iama interpretinto havas pli da valoro ol alia. Nek la Ekleziaj Prapatroj, nek la Reformatoroj. Ni ne forgesu, ke kiel estas rakontita en la Agoj de la Apostoloj, la kredantoj en Berea kontrolis en la Skriboj ĉu oni diris al ili veraĵojn aŭ ne.

Ĉiu kredanto mem havas aliron al la Sankta Teksto. Ĉiu havas la rajton legi kaj interpreti por si mem la Vorton, kaj

ricevi por sia propra vivo, kaj por proklami la savon. Tio estas parto de la Universala Sacerdoteco. Regas la Sankta Spirito, en kongruenco kun la Biblio. Krome, ĝusta interpreto situigas en la komunumo de la sanktuloj, tio estas, kun atento al la kompreno de la historia eklezio kaj de la ekumena eklezio, la kredantoj de aliaj tempoj kaj kredantoj de la aliaj lokoj.

Tamen, ne ĉiu rajtas paroli aŭtoritate kiel vi vidos poste.

Ĉiu kredanto mem havas aliron al la Sankta Teksto. Ĉiu havas la rajton legi kaj interpreti por si mem la Vorton, kaj ricevi por sia propra vivo, kaj por proklami la savon.

Mi nun venas tamen al la funkciado de la protestantaj eklezioj.

Kristo estante la ĉefo, la kapo, la komunumo, la loka komunumo estas gvidata de la Sankta Spirito, kaj estrata de la Pliaĝuloj, Presbiteroj, kiujn la komunumo agnoskis kiel tiuj, kiujn uzas la Spirito.

Kaj tiuj Pliaĝuloj de la komunumo agnoskas kelkajn personojn por prediki, proklami la Vorton kaj celebri la Sakramentojn, ĉar ili vidas en ili kapablon donitan de la Spirito.

Tio signifas ke, la pastoroj ne estas specialaj personoj, krom ke ili studis teologion. Ili ne ricevas specialan potencon. Iliajn taskojn povas fari iu ajn, kiun agnoskas la komunumo per la pliaĝuloj. En protestantismo, ne ekzistas

pastroj, ne ekzistas sacerdotoj.

Fakte, por la Reformatoroj, la Eklezio povas esti difinita kiel: la loko kie estas bone predikata la Evangelio kaj ĝuste celebrataj la Sakramentoj. Kaj tiujn “bone” kaj “ĝuste” difinas la legado kaj kompreno de la Skribo.

Tiu unua difino rilatas al la videbla loka komunumo, sed la difino de la “universala” eklezio estas io tute alia. Ĝi estas esence “nevidebla”, ĉar konata nur de Dio mem. Ĝin konsistigas la aro de la kredantoj, en kiu ajn komunumo ili troviĝas.

Do, se estas instancoj kaj reguloj por la funkciado de la loka komunumo, tute ne estas institucioj por la “universala” eklezio. Kaj instalitaj tiujn ne havus sencon.

Kunlaboro, kunordigo, eblas, kompreneble. Komunaj vortoj, deklaroj al la homaro ankaŭ eblas. Sed neniu rajtas decidi por alia kredanto.

En protestantismo oni povas trovi analogiojn kun la tiel nomata “triobla ofico”, t.e. diakonoj, pastroj kaj episkopoj, sed la signifoj estas efektive malsamaj.

Unue, oni devas konstati, ke plej ofte en la Nova Testamento, la du oficoj de “episkopo” = inspektanto kaj de “pres-

bitero” = pliaĝulo, kiu fariĝis pastro, (tiuj oficoj) estas interŝanĝeblaj.

En la Nova Testamento, la diakono estas la “sociala helpanto” de la komunumo.

Fakte, por la Reformatoroj, la Eklezio povas esti difinita kiel: la loko kie estas bone predikata la Evangelio kaj ĝuste celebrataj la Sakramentoj.

La protestanta pastoro, kiu povus esti asimilita al la katolika pastro, estas kiel mi diris nur simpla kredanto, kiu studis teologion, kaj kies karismon oni agnoskis. La protestanta regiona prezidanto, aŭ inspektoro aŭ foje episkopo, ne estas la katolika episkopo. Li estas simple tiu, al kiu oni agnoskis didonitan kapablon por administri eklezian distrikton, plejofte por tempo.

Fakte, la episkopa ofico de inspektado kaj unueco estas la ŝarĝo kaj respondecado de la grupo de la lokaj presbiteroj, pliaĝuloj, nomita en kelkaj eklezior presbitera konsilantaro.

Kiam ĝi ekzistas, la administrado de nacia organizo (eklezio, federacio, ktp.) estas per reprezentantoj de la lokaj



komunumoj kaj devenas de ili.

Alia elemento, kiu indikas malsamecon: la Diserva vestaĵo.

En katolikismo, ĝi indikas ke la portanto estis ordinita, ke tiu rajtas prave fari ritojn, kaj ne la aliaj.

En protestantismo, la nigra robo estas tutsimple universitata robo. Ĝi indikas ke la portanto studis kaj magistriĝis. Al portanto de la robo, la protestantoj agnoskas ke tiu predikas la Evangelion per la Spirito laŭ la Biblio, kaj same celebras la sakramentojn. Kaj tion li povas fari ankaŭ sen robo, ĉar li aŭ ŝi ne perdas la efikon de la studoj aŭ de la Spirito kiam li aŭ ŝi ne surhavas la vestaĵon.

Mi konstatas, ke de kelkaj jaroj, post multaj esperigaj jardekoj, ni alvenis al tiu kerno kiu restas kiel ŝtono, nome la problemo pri la aŭtoritato.

Paralele, pluraj protestantaj eklezioj uzas terminojn kiel ordini aŭ konsekri rilate al pastoroj, aliaj, kiel la mia, uzas la vorton agnoski. En Francio, la reformitaj pastoroj ne estas ordinitaj, ili estas agnoskitaj. Sed ankaŭ la pliaĝuloj, kaj aliaj respondeculoj same ricevas agnoskon pri specifa ofico.

Antaŭ ol konkludi, mi volas indiki al vi tri nuntempajn riskojn en protestantismo, riskojn rilatajn al la aŭtoritato de la Sanktaj Skriboj.

La unua risiko estas troa aŭtoritato de la Biblia teksto, sen kompreno pri ĝia enkarniĝo, enhomiĝo. Kiam oni diras ke

ĉio en la Biblio, ĉiu komo, ĉiu joto, estas Vorto de Dio, definitiva, oni iras al diktaturo de iu certa, fiksita kompreno, kiu ne povas esti diskutata. Ekzemple, kelkaj diras ke la mondon kreis Dio en la daŭro de ses tagoj, ke la virinoj ne rajtas prediki aŭ devas esti kapŝirmitaj. Tio estas absoluta senerarismo.

La dua risiko estas resanktecigo de la pastoro, pro la persona karismo. Tiu bone parolas, lia prediko efikas, li eĉ kuracas malsanulojn. Kaj li parolas, kaj asertas, foje for de la kontrolo de la Sankta Skribo. Kelkaj pastoroj tiel vagas post iama sukceso. Tio estas absoluta karismismo,

La tria risiko estas la troa graveco donita al la racio en la kompreno de la Skribo, ĝis la punkto ke fakte la racio estas la ĉefa decidanto, eĉ kontraŭ la teksto. Tio estas absoluta liberalismo.

Konklude, mi volas reveni al ekumenismo. Kaj tion mi faras kun malĝoja aserto. Mi konstatas, ke de kelkaj jaroj, post multaj esperigaj jardekoj, ni alvenis al tiu kerno kiu restas kiel ŝtono, nome la problemo pri la aŭtoritato. Ĝi kondukas al nesolveblaj aferoj kiuj estas la ekleziologio, la naturo kaj la estrado de la Eklezio, sekve la naturo kaj roloj de la oficoj, kaj sekve la kompreno kaj rolo de la Sakramentoj, ĉefe de la eŭkaristio, ĉar rilate al bapto, preskaŭ ne plu estas problemoj. Preskaŭ.

Mi atendas la demandojn, kaj dankas pro la aŭskulto. ☞

Pri la prelego en Pelplin *La aŭtoritato en protestantismo...*

Kompiliis Siegfried KRÜGER, DE

Post la prelego sekvis interesa diskuto, ĉar Bernhard Eichkorn parolis pri la aŭtoritato en la Romkatolika Eklezio kaj pri la primato de la Papo.

Bernhard citis Mateo 16.18,19:

18 Kaj mi diras al vi, ke vi estas Petro, kaj sur ĉi tiu roko mi konstruos mian eklezion; kaj pordegoj de Hades ne superfortos ĝin. 19 Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo; kaj kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo; kaj kion ajn vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo.

Philippe respondis, ke tio ne estas temo por la protestantoj kaj ne reagis al la citaĵo de Bernhard. Mi nun iomete studis la Bibliion kaj aldonas protestantan interpreton de la Biblio, kiel mi povas fari kiel laiko. Certe vi scias, ke mi respektas la Romkatolikan Eklezion, sed mi ankaŭ relative multe scias pri la reformacia tempo kaj la argumentado de Martin Luther.

La nuna stato de la Romkatolika Eklezio ja ne estas komparebla kun la tiutempa; Martin Luther eĉ taksis la tiutempan Papon kiel antikriston. Do Luther esplorkontrolis la Bibliion kaj ne akceptis tradicion, kiu ne akordiĝis kun la Biblio. El tio li konkludis la "pastrocon de ĉiuj kredantoj". Tiun esprimon oni ne



povas legi en la Biblio, sed ĝi estas bazita en la Nova Testamento.

Mi citas la tiurilatajn lokojn en la Biblio, kiuj ne estis menciitaj en la diskuto:

Mateo 18.19

18 Vere mi diras al vi, ke ĉio, kion vi ligos sur la tero, estos ligita en la ĉielo; kaj ĉio, kion vi malligos sur la tero, estos malligita en la ĉielo.

En mia Luther-Biblio kun klarigoj mi legas pri Mateo 16.18, ke la apelacio al ĉi tiu vorto estas misuzo de la papeco, ĉar la promeso estas limigita al la persono de Petrus kaj la rajtigo por absolvo pri pekoj estis plivastigita al ĉiuj disĉiploj.

Johano 20.22 ss

22 Kaj dirinte tion, li elspiris sur ilin, kaj diris: Ricevu la Sanktan Spiriton: 23 kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenos, ili estas retenitaj.

1. Petro 2.5

5 vi ankaŭ, kiel ŝtonoj vivantaj, kon-

struiĝas domo spirita, sankta pastraro, por oferi spiritajn oferojn, akcepteblajn de Dio per Jesuo Kristo.

Petro 2.9

9 Sed vi estas raso elektita, pastraro reĝa, nacio sankta, popolo Diposedata, por ke vi proklamu la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en Sian lumon mirindan;

”

Kiel gvidanto de la unua komunumo Petrus estas la historia fundamento, sur kiu ankaŭ la Protestanta Eklezio sin konstruas, kvankam ĝi ne akceptas la primaton de la papeco”

1. Korintanoj 12

4 Ekzistas diverseco de donacoj, sed la sama Spirito. 5 Kaj ekzistas diverseco de servoj, kaj la sama Sinjoro. 6 Kaj ekzistas diverseco de energioj, sed la sama Dio, kiu energias ĉion en ĉiuj. 7 Sed al ĉiu estas donita la elmonro de la Spirito por utilo. 8 Ĉar al unu estas donita per la Spirito la vorto de saĝeco; kaj al alia, la vorto de scio, laŭ la sama Spirito; 9 al alia, fido, en la sama Spirito; al alia, donacoj de resanigoj, en la unu Spirito; 10 kaj al alia, energioj por mirakloj; kaj al alia, profetpovo; kaj al

alia, distingoj de spiritoj; al alia, diversaj lingvoj; kaj al alia, interpreto de lingvoj; 11 sed ĉion tion energias la unu sama Spirito, dividante al ĉiu aparte, kiel al li plaĉas. 12 Ĉar kiel la korpo estas unu, kaj havas multajn membrojn, kaj ĉiuj membroj de la korpo, estante multaj, estas unu korpo; tiel same ankaŭ estas Kristo.

Apokalipso 1.5-6

5 kaj de Jesuo Kristo, la fidela atestanto, la unuenaskita el la mortintoj, kaj la reganto de la reĝoj de la tero. Al tiu, kiu nin amas, kaj nin malligis de niaj pekoj per sia sango, 6 kaj faris nin regno, pastroj al lia Dio kaj Patro; al li la gloro kaj la potenco por ĉiam kaj eterne. Amen.

Apokalipso 5.9-10

9 Kaj ili kantis novan kanton, dirante: Vi estas inda preni la libron kaj malfermi ĝiajn sigelojn; ĉar vi estis mortigita, kaj vi elaçetis al Dio per via sango homojn el ĉiu tribo kaj lingvo kaj popolo kaj nacio, 10 kaj faris ilin al nia Dio regno kaj pastroj; kaj ili reĝas sur la tero.

La temo estas pli komplika kaj ampleksa ol ĉi tiuj malmultaj linioj. Mi nur intencis aŭdigi pli da bibliaj voĉoj ol nur tiu ĉe Mateo 16.18,19. Mi estas certa, ke Jesuo Kristo estas la roka fundamento de nia kredo. Kiel gvidanto de la unua komunumo Petrus estas la historia fundamento, sur kiu ankaŭ la Protestanta Eklezio sin konstruas, kvankam ĝi ne akceptas la primaton de la papeco. ✎

Prediko en Pelplin, 26-an de julio 2007

Filipianoj 4:21-23 kaj Romanoj 8:14-17

Philippe COUSSON, FR

21 Salutu ĉiun sanktulon en Kristo Jesuo. La fratoj, kiuj estas kun mi, vin salutas. 22 Ĉiuj sanktuloj vin salutas, precipe tiuj, kiuj estas el la domanaro de Cezaro. 23 La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo estu kun via spirito.

Filipianoj 4:21-23

14 Ĉar ĉiuj, kiuj estas kondukataj de la Spirito de Dio, estas filoj de Dio. 15 Ĉar vi ne ricevis la spiriton de sklaveco denove al timo; sed vi ricevis la spiriton de adopto, per kiu ni krias: Aba, Patro. 16 La Spirito mem kunatestas kun nia spirito, ke ni estas idoj de Dio; 17 kaj se idoj, tial heredantoj, heredantoj de Dio, kunheredantoj kun Kristo, se vere ni suferas kun li, por ke ni estu glorataj kun li.

Romanoj 8:14-17

Karaj gefratoj, ni alproksimiĝis al la fino de nia kongreso jam. Tial mi elektis tiujn ĉi salutvortojn. Por vere diri, ne. Ne Tio estas la kaŭzo. En tiuj versikloj, mi trovis gravajn vortojn por nia kristana vivo, kaj ankaŭ kiel gefratoj.

Tiuj versikloj konkludas la epistolon de Paŭlo al la Filipianoj, same kiel multaj el la epistoloj finiĝas.

En ĝi Paŭlo lasas lastan mesaĝon al komunumo amata de li, en kiu li pasigis bonegajn tagojn, kaj kiu lasis al li ĝojon.

Tiun leteron li verkis kiam li estis enkarcerigita, aŭ pli bone dirite en gardita domo, t.e. ke li povis akcepti vizitojn. Pri la loko, la analizo varias.

Du eblecoj elstaras, ĉu en Efeso, ĉu en Romo. Fakte tio ne faras multan diferencon,

La temo kiu kuras tra la tuta epistolo estas la ĝojo, la ĝojo pro la Sinjoro, kaj ankaŭ la ĝojo pro la gefratoj. En ĝi li oftege diras al la Filipianoj ke ili estas amataj de li. Oni eĉ povus diri, ke krom la eklezio en Antioĥio, kiu sendis lin, lia preferata plej amata eklezio estis ĝuste tiu de Filipi.

Al tiu amata eklezio li lasas personajn travivaĵojn, impresojn kaj planojn. Kaj li provizas konsilojn kaj admonojn. Ĉiam frate kaj ame.

Kaj nun en tiuj kelkaj versikloj, li adiaŭas ilin, almenaŭ pormomente. Kaj

tiun adiaŭon, tiun saluton ni iomete studos. Ni rigardu al kiu kaj tra kiu tiu saluto estas donita.

La saluto estas en Jesuo Kristo. Kiel diris Paŭlo en alia loko, se oni forprenas Jesuon Kriston, lian morton kaj releviĝon, restas nenio en la kredo, kaj ni estas la plej malfeliĉaj homoj.

Plie, ni vivas el la graco de Jesuo Kristo, graco kiun ni ricevis grace, t.e. senmerite. Kaj tiu graco estas ankaŭ por nia spirito, por nia vivblovo, por nia tuta vivo.

Kaj tiu saluto estas reciproka inter gefratoj, inter sanktuloj.

Sanktulo, t.e. apartigita, elektita. Se Dio aliris al ni, t.e. por ke ni iru al la aliaj, ne por ni mem. Ni estas apartigitaj por servo, servo al Dio, al lia mesaĝo, al la Evangelio, kaj servo al la homoj. Tial ni kristanoj estas ĉiuj sanktuloj, ne ĉar ni estus perfektaj, pli ol aliaj, sed ĉar ni estis apartigitaj, elektitaj. Ni estis adoptitaj de Dio. Ni fariĝis adoptitaj gefiloj de Dio. Tial ni estas gefratoj, gefiloj eĉ de Dio. Ni ne plu apartenas al

tera regno. Kiel diris Paŭlo pli frue en la epistolo, nia burĝrajto estas la ĉielo.

Por Paŭlo, tiu frateco ne estas teorio. Tiuj, kiuj estas kun li estas liaj fratoj, sed ankaŭ la fratoj de la Filipianoj. Kune la fratoj ĉirkaŭ Paŭlo salutas la fratojn en Filipi. Tio estas la frataj rilatoj en la Eklezio.

Kiuj estas tiuj el la domanaro de Cezaro? Multaj konjektis pri tio. Preskaŭ certe, tio signifas almenaŭ ke kelkaj funkciuloj de la Roma Imperio jam kristaniĝis, kaj fariĝis sekve sanktuloj, fratoj.

Kiu salutas aŭ salutu kiun? Tiu, kiu ricevos la leteron salutu la gefratojn, la sanktulojn, ĉiun sanktulon.

La sanktuloj, kiuj estas apud Paŭlo salutas la Filipianojn.

Ĉi-vespere mi volas saluti vin, gefratojn, sanktulojn en Kristo Jesuo, kaj tra vi ankaŭ tiujn, kiuj estas viaj gefratoj en viaj komunumoj, hejme.

Kaj ankaŭ, inter ni, ĉiu salutas la alian kiel frato, kiel sanktulo en Kristo Jesuo, kiu estas la fonto de la graco, la fonto de nia savo.

Kaj nun, ni ĉiuj fariĝu vivantaj leteroj, epistoloj, de gefratoj, de la sanktuloj en Jesuo Kristo kunvenintaj en Pelplin, por saluti la gefratojn, la sanktulojn en Kristo Jesuo, kiuj estas en viaj komunumoj. Vi fariĝu portantoj de la mesaĝo de la graco kaj de la amo de Kristo al viaj komunumoj.

La graco de la Sinjoro estu kun via spirito. Amen. ✨

”

Ni estas apartigitaj por servo, servo al Dio, al lia mesaĝo, al la Evangelio, kaj servo al la homoj. Tial ni kristanoj estas ĉiuj sanktuloj, ne ĉar ni estus perfektaj, pli ol aliaj, sed ĉar ni estis apartigitaj, elektitaj.”

'PACOŜIPO' en Amsterdamo

Jacques TUINDER, NL


En la haveno de nia ĉefurbo albordiĝis en julio pasinta tre speciala ŝipo, nomata "TOPAZ". Diversaj porpacaj organizaĵoj, invititaj de la Eŭropa Centro por Konfliktpreventado, ĝin vizitis. La ŝipo forveturis la 9-an de junio el Japanio kaj faras rondvojaĝon laŭ pluraj havenurboj, kiel Mikonoso [Mykonos], Kopenhago, Adeno kaj Jemeno.

PACOŜIPO estas internacia ne-registara organizaĵo el Japanio, celanta akceli interpopolan harmonion, respekton al homaj rajtoj kaj medioprotektajn aferojn. Ĝi ofertas neŭtralan spacon por laborkunvenoj, gastprelegistoj, limtransirantaj dialogoj, kreativeco kaj interaktivo.

La iniciato estiĝis sekve de ideo de kvar Japanaj studentoj, kiuj demandis al si, kial iliaj najbaraj landoj Ĉinio kaj Korea Respubliko tiel koleris pri Japanaj

lernolibroj. Ili decidis ĉerpi la ĝustajn rakontojn kaj verajn historiojn el plej fidindaj fontoj pere de ŝipvojaĝo laŭ aliaj landoj en 1983. Intertempe la Pacoŝipo havas stabon de ducent homoj, kiuj ĉefe streĉas siajn fortojn favore al mondcivitaneco. Ĝi renkontas multe da kompreno kaj laŭdo en Azio.

Pere de kelkaj esperigaj rezultoj, kiel parolkontaktoj inter Israelaj kaj Palestinaĵoj, intensivaj trejnadaj pri interkomunikiĝo kaj gazetaraj pacomesaĝoj ili ade kaj ade inspiras homojn aliĝi. Ilia plej freŝdata agado rilatas al 'Kampanjo pri Artikolo 9' en Japanio. En ĉi tiu konstitucia artikolo oni povas legi, ke la Japanaj armeaj fortoj praktike neniam funkcii. Bedaŭrinde kunvokiĝis komisiono por ŝanĝi ĉi tiun artikolon. PACOŜIPO kaj aliaj tion kontraŭstaras per ĉiaj rimedoj, *ŝ*




Post brulego

Mu Binghua, Ĉinio

Malgranda knabineto, kiu jam ne havis siajn gepatrojn, nun vivis kune kun sia avino. Ili strikte dependis unu de la alia kaj loĝis en ĉambro de mansardo. Iun nokton la domo neatendite ekfajris, kaj la avino estis brulmortigita dum ŝi tutforte savis sian nepineton. La brulego disvastiĝis senbride kaj daŭre, tiel ke la unua etaĝo de la domo tute estis okupita de la terura brulego. Kia danĝera situacio.

Najbaroj jam vokis fajrobrigadon kaj povis nur panike stari ekstere kaj rigardi. La brulego rapide per sia ruĝa lango blokis ĉiujn en- kaj elirejon. La knabineto aperis malantaŭ fenestro sur la etaĝo kaj laŭte plorkriis por peti helpon. En la homamaso cirkulis informo, ke la vokitaj fajrosoldatoj ĝuste estas aliloke por estingi alian brulegon kaj ke ili alvenos nur post kelkaj minutoj.

Subite, iu viro aperis ĉe la pordo, jam en la fajro, portante ŝtuparon sur siaj ŝultroj. Li metis ĝin muren; laŭ ĝi, supren, li penetris en la fajran maron. Kiam li refoje montris sin, oni vidis ke li portas la malgrandan knabinon en la brakoj. La savita infano estis transdonita al la



homamaso malsupre atendanta kaj la viro malaperis en la malhela nokto

Sekvanta enketo pri la brulego trovis ke la infano, post la morto de sia avino, jam ne havas iun ajn parencon en la mondo. Kelkajn semajnojn poste, la urba institucio pri filantropio okazigis amaskunvenon por interkonsiliĝi pri kiu estu taŭga adopti tiun kompatindan infanon.

Iu instruistino volis adopti ŝin, dirante ke ŝi povas garantii ke la infano ricevos bonkvalitan edukon. Ankaŭ iu terkulturisto volis akcepti ŝin kaj afable montris, ke vivante en lia vilao en bela vilaĝo, la infano estos pli sana, pli kontenta kaj do pli feliĉa. Aliaj laŭvice faris paroladon

por gajni la rajton pri la adopto. Sed, verŝajne neniuj parolinto plaĉis al la knabineto, kaj ŝi ne esprimis sian promeson.

Laste, la plej riĉa loĝanto de la urbeto ekstaris kaj rekomendis sian familion. Li emfazis kun granda memfido: “Ĉiujn tiujn bonojn, kiujn vi eldiris, mi tute povos doni al ŝi. Krome, mi kapablos provizi ŝin ankaŭ per mono kaj tiaj objektoj, kiajn oni povas per mono aĉeti.” La riĉulo ĵetis sian rigardon al la knabineto, sed li same ne akiris ŝian respondon.

De la komenco ĝis la fino, la malgranda knabino ĉiam tenis silenton kaj direktis la rigardon nur al la planko. Tio kompreneble metis la kunvenon en misharmonian etoson. Vole nevole la prezidanto de la kunveno povis nur plurfoje fari peton: “Kiu ankoraŭ intencas daŭrigi la paroladon?”

Nur tiam, iu viro alvenis de la malantaŭo de la halo ĝis la podio. Liaj paŝoj estis malrapidaj kaj pezaj. Ŝajne li estis eltenanta ian suferon. Li turnis sin al la knabineto, rekte atingis ŝin kaj ĝoje etendis la brakojn antaŭ ŝi. El la ĉeestantoj aŭdiĝis gajaj krioj. Sur liaj manoj kaj brakoj ĉie videblis teruraj cikatroj. La okuloj de la knabineto ekbrilis kaj ŝi tuj ĵetis sin al li, klare kriante: “Estas li! Estas li kiu savis min el la brulego!” Ŝi eksaltis kaj per ambaŭ braketoj tiel strikte ĉirkaŭis lian kolon kiel ŝi faris tiam en la terura nokto, kiam la senkompata brulego estis preta engluti ŝin. Ŝi kaŝis la vizaĝon en lia sino kaj ploretis momenton. Tuj poste ŝi levis sian kapon kaj bele ridetis al li.

“Nun ni povas fini nian kunvenon,” deklaris la prezidanto de la kunveno...

✎

DANKON!



Okaze de mia eksigo de la KELI-estraro mi ricevis mirindan florbukedon de la estraro, pere de Bengt Olof Åradsson. Pli frue Els van Dijk sendis skriban dankesprimon. Ĉio tre ĝojigis min. Propradire mi ne meritas tian honoron. Mi ja membriĝis en la estraro jam 1986 sed mi nur estis ordinara membro sen pezaj taskoj. Sed ĉiam mi sentis min hejme inter miaj estrargeamikoj kaj, kompreneble, en la granda KELI-familio!



Ame via Britta Rehm.



KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

ALIĜILO

al la KRISTANA KONGRESO

(58-a kongreso de KELI, hotelo ESPERANTO Pribylina, Slovakio)

28. 7. – 4. 8. 2008

(notu: lundo ĝis lundo!)

La kristanan kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

Familia nomo:.....

Persona nomo:.....

Adreso:.....

.....

Lando:.....

Telefono: Faksilo:.....

Retadreso:.....

Mi mendas ĉambron: unu-litan du-litan

Mi estas vegetarano: JES NE

Mi preferas loĝi kun:.....

Dato:.....

Subskribo

Notoj de LKK:

La aliĝilon sendu al:

Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Podíbrady, Ĉeĥio

Telefono: 420 325 615 651

E-mail: cea.polnicky@quick.cz

Pribylina estas ĉarma submontara vilaĝo proksime de Liptovský Mikuláš en montaro Vysoké Tatry, ĉe la limo kun Pollando. Ĝi estas bone atingebla trajne kaj aŭtomobile (parkejo ĉe la kongresejo).

Hotelo ESPERANTO estas parte rekonstruita. Ĉiuj ĉambroj kun necesejo kaj duŝo. Je nia dispono estos malnova preĝejo en proksima Naturmuzeo de popola arkitekturo.

Sumoj estas

La aliĝo validas nur post la pago de la garantia sumo.

	<u>ĝis 31.12.2007</u>	<u>ĝis 31.3. 2008</u>	<u>post 1.4. 2008</u>	<u>Restadkosto</u>
Kategorio A :	10	20	30	120
Kategorio B :	40	50	60	220 (270)*

* unulita ĉambro

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko

Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj

Monsendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.

Se eblas, uzu UEA-postĝirkonton aŭ pagu prefere al UEA por konto KELK-P de KELI

Organizaj informoj:

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn - JES NE

Mi povus prelegi pri :

.....

Mi postulus (specialajn dezirojn):

.....


Mi alveturos: trajne aŭtomobile

kaj mi alvenos (proksimume):.....

.....


El la provizora programo:

- ✓ oficiala malfermo de la kongreso
- ✓ interkona vespero
- ✓ diservo kun sankta manĝo
- ✓ prelegoj, kantado
- ✓ koncertoj
- ✓ jarkunveno de KELI
- ✓ tuttaga busa ekskurso al la montaro Vysoké Tatry (Altaj Tatroj)
- ✓ duontagaj ekskursoj – pieda kaj busaj (detalaj informoj pli poste)



La unuaj aliĝintoj.

- | | |
|-----------------------------|------------|
| 1. ÅRADSSON Bengt Olof, | Svedio |
| 2. RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes, | Hungario |
| 3. GAILLARD Samuel, | Francio |
| 4. VAN DIJK KUPERUS Els, | Nederlando |
| 5. COUSSON Philippe, | Francio |
| 6. KRÜGER Siegfried, | Germanio |
| 7. SANDOZ Andreo, | Svislando |
| 8. FARKAS-TATÁR Éva, | Hungario |
| 9. SOMHEGYI Zoltán, | Hungario |
| 10. BAGI Irén, | Hungario |
| 11. MASTALIÖSKA-PYDA Maria, | Pollando |
| 12. POLNICKÝ Pavel, | Ĉeĥio |



Ŝanĝema eklezia komunumo

Britta REHM, SE

Espereble interesas vin aŭdi iom pri mia eta baptista eklezia komunumo ĉi tie en Gotenburgo.

Depost 1965 mi estas membro de la "Betel" eklezia komunumo, fondita jam en 1903. De tempo al tempo la membraro maljuniĝis, multe da gejunuloj aŭ infanoj ni ne havis ĉar mankis tuta generacio inter 20 kaj 40 jaroj.

Ni diskutis, cerbumis kaj kompreneble preĝis pro la situacio. Kion fari? Ni inter alie kontaktis pli grandan komunumon el la sama baptista kongregacio, nome "Saron". Finfine ni trovis solvon sufiĉe taŭgan por ke ni almenaŭ provu.

La 23an de majo 2004 grupo de "Saron" kaj grupo de "Betel" fondis novan komunumon kun la nomo "Matteuseklezio". Sed en la sama ejo de la iama "Betel" ĉar ni posedis la ejon jam de longe. Poste ni modernigis kaj riparitis ĝin. Ni havas du pastorojn, viro 30% kaj virino 25% deĵortempe. Nia ekonomio nun ne permesas pli. Iom da diakona laboro ni ankaŭ faras.

Nun al la plej originala: Ni forprenis la kutimajn longajn benkojn (magazenigis ilin)! Anstataŭ ili ni nun havas

rondajn tablojn kun kvin seĝoj ĉirkaŭe. Kiel en kafejo! Pro tio ni ordigis etan kuirejon en malantaŭa angulo en la preĝeja salono. Meze de la salono mallarĝa, longa, ruĝa tapiŝo formas mezan trairejon al la fono. Altaron ni ne havas. Sed en la fono ni havas belan pentraĵon, preĝlokojn kaj grandan kandelujon kun sablo por ke oni povu tien meti kandeletojn dum la preĝado. La baptoakvujojn ni trovas tie maldekstren. Apude estas koncertpiano kaj orgeno. Nia intenco kaj celo estas ke homoj sentu sin bonvenaj ĉe ni, precipe se ili ne ofte vizitas preĝejojn. Pro tio ni komencas per kafrinkado ĉirkaŭ la tabloj por ebligi pli bonan kontakton. Se ni eble vidas solan fremdan personon ĉe iu tablo, ni "hejmanoj" demandas ĉu ni rajtas sidi apude. Post proksimume duona horo, la vera Diservo komenciĝas per psalmo aŭ musikpeco. Sekvas vera prediko, kelkfoje parte en formo de dialogo. La lasta parto konsistas el la Sankta Manĝo. Mirinde vidi ke la plej multaj vizitantoj, inter alie multaj gejunuloj, partoprenas kun ni en la Celebrado. Pri tio ni ja vere sopiris!

La etoso en la eklezio estas bonveniga, varma kaj neformala. Multaj novaj homoj venas kaj la komunumo kreskas bone, ankaŭ pere de junaj familioj. Pro tio ni komencis havi infanaktivecon denove.

Ni estas tre dankemaj pro ĉiu beno de Dio rilate al niaj klopodoj kaj ni sentas nun pli da ĝojo kaj espero. ✂



Ankaŭ en nuna jaro ni kolektiĝis en la kadro de 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso kaj do ni ankaŭ hodiaŭ iomete plu pripensu pri Ekumeno.

Estas jam rememorinde, ke L.L. Zamenhof forte pripensis la disdividitecon de la kredantoj en diversajn religiojn kaj kadre de sia hilelismo-homaranismo pensis pri “neŭtrala religio”. Liaj pripensoj kompreneble ne plaĉis al siaj “neŭtralaj” kolegoj, kiuj estis malpli religiemaj ol li, kaj ankaŭ ne gvidis al ĝojo de la katolikaj samideanoj, kiuj ne deziris “novan religion”, vidinte en la zamenhofa verko pli la neŭtralan lingvon ol la ideologion. Prelato kaj Esperantisto Aleksandro Dambrauskas el Kaunas vidis siatempe en la hilelismaj dogmoj de Zamenhof eĉ konflikton kun la instruoj de Jesuo Kristo.

Tamen hodiaŭaj kredantoj de la tria jar-milo forte sentas la dividitecon en diversaj konfesioj, precipe memorante la vorton de Jesuo “ke ĉiuj estu unu ... por ke la mondo kreu” (Joh 17,21) kaj sopiras jam longe la unuecon. Ekzistas multaj elstaraj homoj, kiuj laboris kaj laboras por tio celo. El tiuj mi mencias la katolikan sacerdoton Max Josef Metzger, kiu dum sia porpaca agado ne ĉiam laboris en konkordo kun sia eklezio. Rezulte al tio li baldaŭ rimarkis, ke sen ekumeno kaj frateco nek la kristana Esperanto-movado nek la kristana paco-movado povas sukcesi.

Ĉar homoj estas necesaj por antaŭenpuŝi ĉiam ion, do ni ankaŭ scias, ke ĉiu movado ne vivas de si mem – movado vivas de personoj. Ĉiu vigla persono estas granda donaco por movado. Do ni certe fieras pri la kontribuoj de pastro Adolf Burkhardt por la esperanta ekumena movado. Bedaŭrinde li mortis tro frue, sed lia senlaca laboro donacis al ni dum la pasintaj jardekoj unue la internacian himnaron *Adoru kantante* (1971), *Tero kaj Ĉielo kantu* kaj fine 2001 *ADORU* kunlaborante kun la pastroj Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger. Vere ekumena donaco al ni ankaŭ hodiaŭ, ĉar ni nun povas ekumene diservi, kanti, sciante “kiu kantas – tiu preĝas duoble”. Kaj al ni restas la tasko, ke el tiuj fontoj kresku kristana vivo.

Alia grandioza fonto por ni estas la Sankta Biblio. Ĝi estas la komuna fekunda grundo, nur el kiu kresku la kristana unueco. Jesuo donis al siaj disĉiploj la taskon de la unueco. Ju pli ni vivas bible, des pli ni estas kunaj en Jesuo Kristo.

Do por mi estas ne eltenebla, ke post multaj paŝoj de ekumena agado antaŭen nun el la Vatikano laste venis ĉi tien sonoj, kion mi en la momento nur povas taksii kiel retroiro en tempojn, kiam la eklezioj tre dise staris unu de la alia kaj ĉiuj volis esti pravaj. Pri kio temas: Kardinalo William Levada, prefekto de la kredo-kongregacio en Romo, publikigis paperon, ke la, el la Reformacio ekzistantaj kristanaj

komunumoj ne estas eklezioj laŭ la Roma kompreno. Kaŭzo estus la manko de apostola seninterrompeco de ordinado-sakramento. En paralela komentario apologiis la Vatikano la instruon, ke la, de Kristo fondita eklezio, vere ekzistas nur en la katolika. Ke tiu pensmaniero vere estus diskutenda inter la eklezioj, momente nur marĝene tuŝu nin.

Ke ĵus nun oni publikigis tiun paperon, montras al mi, ke oni verve pridiskutas en la momento en la rom-katolika eklezio tiun aferon. Se oni de alia flanko pritraktas la eldiron, oni nur povas konkludi, ke la papero certe estas Roma, sed ne katolika. Ĉu oni vere ne volas alproksimiĝi, „ke ĉiuj estu unu“, kiam en ĉiuj tempoj kaj de ĉiuj kristanoj oni kredis je la sola eklezio de Jesuo Kristo? Kie momente restas la respekto por la „eklezieco de la ekumena partnero“? Al la penso, ke al la rom-katolika eklezio povus manki elementoj, kiuj estas gravaj por la aliaj eklezioj, en la oficiala Romo momente oni ne donas spacon.

Per tiuj malmultaj instigoj mi volas

veni al la fino. Mi rememoras la ekfloron de ekumeno en la Dua Vatikana Koncilio, ĝi estis kvazaŭ signo de ekirado al nova unuiĝo. Espero estis ĉe ĉiuj kredantoj. Post multaj larmoj dum la jarmiloj oni sin sentis ĉe nova komenciĝo. La unuecon de la homaro, la unuecon de religioj, la unuecon de la kristanaro oni nove serĉis, por ke vere rekomenciĝu nova pozitiva epoko.

Vizioj de Papo Johano-Paŭlo la dua antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj en Nov Jorko 1965 pro nova espero por la tria jar-milo necesas nun pli ol antaŭe. Estus ja vere fatala, se ni lasus nin gvidi nur per negativa kalkulado, kaj se ni ne lasus nin gvidi de vizioj, kiuj portas en si pozitivan sencoplanan valoron kaj kiuj do donas direkton kaj kuraĝon al komuna agado.

Ĉu ĉiuj vizioj en ni mem vere realiĝos, mi pensas restas en la manoj de Dio. Mi mem ne volas perdi jam atingitan fratecon inter ni esperantoj. ✎

La 2-a **Koncilio de Vatikano** estis la 21-a ekumena koncilio de la katolika eklezio kaj inter la plej gravaj. La koncilio estis kunvokita de papo Johano la 23-a je la 25-a de januaro 1959. La oficialan kunvokon sekvis tri jaroj da laboro, dum kiuj prepara komisiono konsultis ĉiujn katolikajn episkopojn kaj difinis la temojn traktotajn dum la plenkunsidoj de la koncilio.

Johano la 23-a oficiale malfermis la 2-an Koncilion de Vatikano la 11-an de oktobro 1963 en la Vatikana Baziliko. Post la morto de Johano la 23-a lia posteulo Paŭlo la 6-a daŭrigis la koncilion. Ĝi dividiĝis en naŭ sesiojn kaj kvar periodojn kaj finiĝis la 7-an de decembro 1965. Ĝi promulgis 16 dokumentojn: kvar konstituciojn, tri deklarojn kaj naŭ dekretojn.

La koncilio subtenis la liberecon de religio kaj la dialogon kun anoj de aliaj fidoj. Jam laŭ la kunvoko ĝi estis ”paŝtista” koncilio; tio signifas, ke ĝia celo ne estis difini dogmojn aŭ kondamni herezaĵojn. Unu el ĝiaj agoj estis reformo de la liturgio, per kiu ĝi interalie reduktis la signifon kaj uzon de la latina lingvo en liturgio. (teksto ĉerpita el Vikipedio)

La kulpokonfeso de Stuttgart

Kontribuo por la diskutoj de la 12-a ekumena kongreso de KELI kaj IKUE inter la 27-a de julio kaj la 3-a de aŭgusto 1996 en Szombathely (Hungario).

Tradukis kaj prezentis : Siegfried KRÜGER, DE

Tre estimataj, karaj ekumenaj gefratoj, jam en la pasinta jaro, okaze de la 50-jariĝo de la *Kulpokonfeso de Stuttgart*, mi intencis konnatiĝi vin kun ĉi tiu rimarkinda dokumento; bedaŭrinde mankis al mi la necesa tempo. Sed ĉar la deklaro ankaŭ hodiaŭ estas aktuala kaj rilate al la kongresa temo en speciala maniero, mi nun volas prezenti ĝin al vi. Multajn jarojn mi eĉ loĝis en Stuttgart, nuntempe mi nur deĵoras en tiu bela ĉefurbo de la federacia lando Baden-Virtembergo.

Pri kio temas en tiu dokumento, datita la 19-an de oktobro 1945? La deklaro devenas de elstaraj protestantaj kristanoj, rilatas al ekumeno, al la fino de terura milito kaj al tio, kio okazis en la germana nomo dum la naziisma periodo al multaj popoloj kaj landoj.

Jam post la Unua Mondmilito, ĝis la jaro 1931, por la germanoj la sinteno de la eksterlandaj eklezioj rilate al la demando pri la militkulpado estis la ĉefa obstaklo por la ekumena movado en Germanio. Tiun eraron de senfrukta diskutado pri militkulpado oni nepre devis eviti, se la *Ekumena Konsilantaro De Eklezioj* (EKE) volus fari repacigan servon.

La afero komenciĝis per kontaktoj inter la *Konfesanta Eklezio* (KE), kiu estis branĉo de la protestanta eklezio, kaj EKE jam en la jaro 1942 por pritrakti

la kulpo-demandon en la ekumena movado. Finfine en oktobro 1945 vojaĝis delegacio de EKE kun reprezentantoj el eklezioj de Britio, Francio, Usono, Nederlando kaj Svisio al Stuttgart kaj renkontiĝis kun reprezentantoj de la *Konsilantaro de la Protestanta Eklezio en Germanio* (KPEG), fondita ne pli frue ol en la jaro 1945 en la urbo Treysa.

Postuli kulpokonfeson ne eblis, ĝi devis okazi spontanee. La delegacio de EKE intencis iniciati materian helpon, sed bezonis por tio mem la helpon de KPEG (“Helpu nin, por ke ni povu helpi”). La rezulto estis la jena deklaro:

La Konsilantaro de la Protestanta Eklezio en Germanio en sia kunsido je la 18-a/19-a de oktobro 1945 en Stuttgart, bonvenigas reprezentantojn de la *Ekumena Konsilantaro de Eklezioj*.

Ni estas dankaj pro tiu vizito tiom pli, ĉar ligas nin kun nia popolo ne nur granda komuneco de la suferoj, sed ankaŭ solidareco de kulpo.

Kun granda doloro ni diras: Fare de ni estis alportita senfina sufero super multaj popoloj kaj landoj. Kion ni ofte atestis en niaj paroĥoj, tion ni nun elparolas nome de la tuta eklezio: Dum multaj jaroj ni batalis nome de Jesuo Kristo kontraŭ tiu spirito, kiu en la nacisocialisma

reĝimo de perforto trovis sian teruran esprimon; sed ni akuzas nin, ke ni ne konfesis pli kuraĝe, ne preĝis pli fidele, ne kredis pli gaje kaj ne amis pli arde.

Nun devas esti farita nova komenco en niaj eklezioj. Fonditaj sur la Sankta Skribo, kun tuta seriozeco direktitaj al la sola Sinjoro de la eklezio, ili komencas purigi sin de kredfremdaj influoj kaj ordigi sin mem. Ni esperas al la Dio de graco kaj kompatemo, ke Li uzos niajn ekleziojn kiel ilon kaj donos al ili plenpovon, proklami Sian Vorton kaj efektiviĝi obeon al Sia Volo ĉe ni mem kaj ĉe nia tuta popolo.

Plenigas nin kun profunda ĝojo, ke ni scias nin kore ligitaj kun la aliaj eklezioj de la ekumena komuneco pere de ĉi tiu nova komenco.

Ni esperas je Dio, ke per la komuna servo de la eklezioj la spirito de perforto kaj de venĝo, kiu hodiaŭ denove volas potenciĝi, en la tuta mondo estos bridita, kaj la spirito de la paco kaj de la amo ekregos, en kiu la turmentita homaro sole trovos resaniĝon. Tiel ni petas en horo, en kiu la tuta mondo bezonas novan komencon: Venu Kreanto Sankta Spirito.

Stuttgart, la 18-an/19-an de oktobro 1945

En la deklario mankas iu ajn akuzo kontraŭ aliaj, tamen sekvis akraj diskutoj pro kaj kontraŭ la formuloj. Rimarkinde eble estas ankoraŭ la scio pri tio, kion la membroj de la unua *Konsilantaro de la Protestanta Eklezio en Germanio* mem estis suferintaj: Koncentrejo, malliberejo, domaresto, malpermesoj paroli

kaj skribi, traserĉo de la domo, eks-oficigo, maldungo kaj multon alian plu.

Plej malfrue nun vi eble demandos, ĉu tio, kion mi ĝis nun prezentis al vi, tuŝas la kongrestemon “Konservi la Kreitaron“. Sed unue mi volas danki kaj komplimenti al niaj paŝtistoj en KELI kaj IKUE, kiuj tiel persiste konfrontas nin kun tiu temo.

Al mi venis dum la legado de la deklario la penso, ke rilate al la konservado de la kreitaro espereble ne iam necesos simila deklario de la homaro, en kiu oni same devos diri: “Fare de ni estis alportita senfina sufero super la

”

Fare de ni estis alportita senfina sufero super la kreitaro kaj ni akuzas nin, ke ni ne konfesis pli kuraĝe, ne preĝis pli fidele, ne kredis pli gaje kaj ne amis pli arde por konservadi la kreitaron.“

kreitaro kaj ni akuzas nin, ke ni ne konfesis pli kuraĝe, ne preĝis pli fidele, ne kredis pli gaje kaj ne amis pli arde por konservadi la kreitaron.“

Sendube ni jam nun estas kulpa, sed eble ni povas provi pere de nia agado aŭ neagado fari paŝon en la ĝustan direkton. Nia partnero estas la Kreanto mem. ✎

Informetoj

КАВКАЗСКИЕ МИНЕРАЛЬНЫЕ ВОДЫ
ЖЕЛЕЗНОВОДСК
Курортный зал
Фотс Ю. Жванко
Кинотеатр «Кристалл»
Фотс К. Бабеларова

Estimata sinjoro, Siegfried!

25.06.07
N. Tagil

Hodiaŭ mi sendas al vi la spekaron
por la 1^a diunjaro, 2007 jaro.

Niaj kristanoj - esperantistoj multe dankas
por la revuoj. Ili estas interesaj kaj helpas al ni
kunigi nin.

Kun bondeziroj kaj kristanaj salutoj
- Larisa

representanto por Rusio, Belorusio,
Kazakio kaj Ukrainio.

© Издательство «Кавказская здравница Минводы, 1965
ВГ-37990. Тираж 100 000. Цена 5 коп. 31232/1. Зак. 6197
СПИРАЛЬТЬ ТОЛЬКО В КОНВЕРТЕ

Korektoj

Ni pardonpetas, ke en la pasinta numero de Dia Regno, 4/2007, troviĝas kelkaj eraroj. Inter ili la plej gravaj estas:

- 1) Kune kun la artikolo *Heroldo de senkompromisa homeco* ni ne menciis la eldonanton de la libro *Heroo de Amo*. Ĝin eldonis konata ĉeĥa eldonejo KAVA-PECH de keliano Petro Chrdle.
- 2) Pro iu nekomprenata teknikaĵo ĉe la presejo, unu tekstoparto forfalis el la sama artikolo. Bonŝance Pavel Polnický trovis la eraron antaŭ la forsendo kaj povis kunsendi la mankantan tekston. Espereble vi ne havis tro da problemoj ĝui la tekston sur la ĝustan lokon.

La redaktoro

El alt' ĉiela venas mi

Vom Himmel hoch da komm ich her

Verkis (germane): Marteno LUTERO (Martin Luther)

Esperantigis: William John DOWNES

Prilaboris kaj la sesan strofon aldonis: Albrecht KRONENBERGER

Fonto: ADORU 252 kaj

<http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/e/elaltcxie1.html>

- | | | | |
|---|--|---|---|
| 1 | El alt' ĉiela venas mi
kun bona, nova histori',
kun histori' de l' Dia sav',
kantota nun por via rav': | 5 | Vi trovos en malpompa stal'
la Dian Filon sub vual'
de povra bebo, tamen Li
la Reĝ' de ĉiu galaksi'." |
| 2 | El elektita virgulin'
naskiĝis beb', ĝojigi vin,
fragila beb', potenca por
tristecon vian preni for. | 6 | Do kuru ni al Li kun gaj'
Samkiel la paŝtistoj, kaj
rigardu, kion donis Di'
per Sia kara Fil' al ni. |
| 3 | Li estas Kristo, la Sinjor',
Li volas homojn en dolor',
konsoli, levi el mizer',
por pekoj esti la ofer'. | 7 | Ho nobla gast', al Vi bonven'
ĉe ni, plagitaj de ĉagren',
de pekemeco kaj fier'. —
Ho, kiel danki Vin en ver'? |
| 4 | Feliĉon ĉian portas Li
al vi de l' Patro, via Di',
ke vivu vi kun ni en ĉoj'
nun kaj post via monda voj'. | 8 | En alta trono glor' al Di',
ĉar Sian solan Filon Li
donacis; do la anĝelar'
ĝoj-kantas pro la nova jar'. |